

INTERLANGUAGE



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

**"PEOPLES SPEAKING TO
PEOPLES"**

**A WORLD INTERLANGUAGE
NEEDED**

**ESPERANTO SOLVES THE
PROBLEM**

AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la
ESPERANTO-ASOCIO
de NORD-AMERIKO*

JULY-AUG. 1951

Twenty-five Cents

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

Vol. 65

114 West 16th Street
New York 11,
N. Y.

No. 7-8

Associate Editors: Dr. W. Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. Norman McQuown, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Howard E. Latham, Myron Mychajliw.

Sustaining Board: Dr. Luella K. Beecher, John M. Brewer, Olive Campbell, J.F. Clewe, Preston Davis, Jr., E.G. Dodge, R.E. Dooley, Harold Ewen, Dr. G.P. Ferree, Anonymous, Thomas Goldman, George Hirsch, H.F. Keller, Eulalia Marks, Tony Nabby, R. C. Palmer, D. B. Richardson, Tom Robbins, Beatrice Ruff, Mazah Schulz, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Isabel Snelgrove, Francis H. Sumner, Adeline Vigelis, Anonima, Dr. Francis E. Ballard, Dr. W. Solzbacher.

Office Assistants: Lola Mae Muse, H.S. Harris.


KON-TIKI

By THOR HEYERDAHL

The greatest true adventure story ever! Now available in Esperanto. 6 modern Norsemen cross the Pacific on a 40-foot raft to unravel a 1000-year-old mystery.

From first gripping page to last, you will say it's wonderful. The Esperanto edition has been translated in vivid, flowing style, retaining all the wry good humor and exciting adventure. With 80 photographs. Bound in blue cloth, stamped in gold.

\$3.90 Postpaid



Enjoy reading this exciting best seller today! Order from:

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

Jarabono eksterlande, \$1.50 por kalendara jaro

Make Checks Payable to *Esperanto Association of North America*

Minimum Membership in E.A.N.A.—\$3.00 per Year

Active Sustaining Membership — \$5.00 per Year

AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 65

JULY-AUGUST 1951

No. 7-8

ESPERANTO IN AMERICA

THE Forty-First Annual Congress of the *Esperanto Association of North America*, held at Spencer, Iowa, from June 29 to July 1, created a great deal of interest not only in the local press, which gave it first page coverage every day, and on the radio, but also throughout Iowa and the United States. Reports published in newspapers in the States of Nebraska, Minnesota, Illinois and New York have come to our attention. Undoubtedly there were others. There were references to the peaceful "bombardment" of Spencer by our member, *Preston Davis, Jr.*, who dropped leaflets published by our Association from his personal airplane before landing on the airport, as well as to the reports submitted by the President of our Association, *Dr. W. Solzbacher*, and its General Secretary, *G. Alan Connor*. The work of the local Esperanto leaders, *C. W. Baldwin* and *Konrad Kail*, was also given credit.

In the Congress of the United States, *Representative Karl Stefan* of Nebraska drew renewed attention to the importance and practical use of the Interlanguage by inserting detailed information about Esperanto in the *Congressional Record* of June 13, 1951. In his "extension of remarks" on the occasion of Flag Day, the Congressman included a short statement by our Filipino member, *Maximiano M. Villareal*, about the Philippine Flag and American Democracy, followed by Mr. Villareal's article on the Philippine Flag in *Esperanto and English*, reprinted from the *American Esperanto Magazine* (with full credit) as well as by an unabridged reprint of *Dr. W. Solzbacher's* article on Esperanto as it appears in the current edition of *The New International Year Book* (Funk & Wagnalls Co.) showing the latest developments in the Esperanto movement and the present uses of the Interlanguage in many fields of human endeavor. Reprints from the *Congressional Record* will be mailed to our members and subscribers and will be available for large scale distribution.

Some publicity for Esperanto was also obtained as a result of the recent interview about the Esperanto Movement in the United States on the French language *Voice of America* program, *Ici New York*. Photographs showing *Dr. Solzbacher* and *Mademoiselle de la Meslière* during that interview have appeared so far in the *American Esperanto Magazine*, *Heroldo de Esperanto*, *La Praktiko*, *The Spencer Daily Reporter*, and *The Spencer Times*.

ESPERANTO IN ACTION



In the Brazilian Parliament a bill concerning the official use of Esperanto was introduced by Senhor Ferdinando Ferrari, Representative of the Labor Party, of which President Getulio Vargas of Brazil is the leader. The bill instructs the Ministry of Foreign Affairs to approach all nations with which Brazil maintains diplomatic relations concerning the possibility of adopting Esperanto as a neutral auxiliary language in international relations. If the bill becomes law, details will be worked out by a committee consisting of the Minister of Foreign Affairs as Chairman, the Director of Political and Cultural Affairs in the Ministry, as well as one representative each from the Ministry of Education, the Brazilian Institute of Science, Education and Culture, and the Brazilian Esperanto League.

On his return from the United States Professor J.B. Mello e Souza, President of the Boy Scouts of Brazil, delivered a number of lectures in colleges and learned societies and over the radio, describing the presentation of the Esperanto Petition to the United Nations and last year's Congress of the Esperanto Association of North America, at Portageville, N.Y. Professor Mello e Souza played an important role in both events.

Travel Folders and illustrated booklets in Esperanto were published recently by the following cities and agencies: Spa and Bruges, Belgium; Rome and Como, Italy; Bamberg, Bonn, Nuremberg, Konstanz, and the West German Railroads, Germany; Angers, France; Karlovy Vary and Slovak Mountain Grottoes, Czechoslovakia; Besso, Japan; KLM Airlines, Netherlands.

In Vienna's former Imperial Palace (Hofburg) a 'Pantheon of the World Esperanto Movement' was solemnly opened June 3 in connection with the International Esperanto Museum. The Post Office Administration used a special cancellation in Esperanto and German.

The Moroccan press paid much attention to the trip of four young Swedes who traveled through Europe and North Africa using no other language but Esperanto. Apparently they had a wonderful time and found Esperanto-speaking friends everywhere.

In the Amerikahaus (American Cultural Center) of Munich, Germany, Dr. Siegfried Ziegler, President of the German Esperanto Association and Instructor of Esperanto at Munich University, recently presented the case for Esperanto at one of the public forums.

ESPERANTO-KRONIKO

La Voĉo de Ameriko ricevis multajn leterojn el Francujo, Britujo kaj Nederlando sekve de intervjuo pri Esperanto, kiu okazis la 12-an de Junio en la franclingva programo 'Ici New-York'. Bildo montranta F-inon Nicole de la Mesliere kun D-ro W. Solzbacher, Prezidanto de EANA, dum tiu intervjuo aperis en *Amerika Esperantisto*, *Heroldo de Esperanto*, *La Praktiko*, *The Spencer Daily Reporter* kaj *The Spencer Times*.

Interesa artikolo pri Esperanto aperis en la Julia Numero de *The Annuitant*, organo de la grava Nacia Asocio de Pensiitaj Registaraĵ Oficistoj, kies Kasisto estas nia eminenta samideano Ernest G. Dodge Plenigante unu kolonon kaj donante la adreson de EANA por informpetoj, la artikolo prezentas trafikajn argumentojn de s-ro Dodge por nia lingvo kaj atentigas pri la intereso, kiun ĝia lernado havas por pensitaj oficistoj. *The Annuitant* aperas en Washington kaj havas eldonnombron de proksimume 65,000.

Sukcesojn el la kampanjo por varbi novajn membrojn havas: A. J. Rogus (2); M. Starr (3); B. Beckman (1); *Esperanto-Klubo en Fitchburg* (2); E. G. Dodge (1); R. C. Betteridge (1); Dum la Kongreso en Spencer aliĝis al EANA kvar novaj membroj.

Abonis 'Amerikan Esperantiston' per Publikaj Bibliotekoj: *Joy Postle Blackstone* (1); *Esperanto-Klubo en Fitchburg* (10); *Esperanto-Klubo en Los Angeles* (10); *Vera Beintker* (1); *Julie Regal* (1); *Esperanto-Klubo en Cleveland* (1).

Niaj Membroj daŭrigas la kampanjon 'Leteroj al la Redaktoro'. Lastatempe aperis en diversaj gazetoj 'leteroj', verkitaj de niaj membroj: *S-ino A. J. Vigelis*, Long Beach, Cal.; *A. Hughes*, Hillsboro, Oregon; *C. Fisber*, Meadville, Pa.; *P. Heinrich*, Rochester, N.Y.

"The State Magazine", Columbia, S. C., publikigis je la 3-a de Junio du-paĝan, ilustritan artikolon *World Citizenship Through Esperanto* (Mond-Civitaneco per Esperanto), verkitan de nia samideano *James A. Clarkson*. S-ro Clarkson interese priskribis siajn spertojn en korespondado kaj donis skizon pri la gramatiko kaj praktika uzo de Esperanto tra la mondo.

Speciala intervjuo pri Esperanto okazis ĉe Radio-Stacio WEIM, Fitchburg, Mass., la 12-an de Junio. Partoprenis *S-roj Wesley Fisher* kaj *F. M. Cole* de la loka Esperanto-Klubo. Dum Junio la Klubo aranĝis du-semajnan ekspozicion pri Esperanto en la Publika Biblioteko.

Noto: Sur la du sekvantaj paĝoj aperas fotoj pri la 41-a Kongreso. Membroj, kiuj ĉeestis la Kongreson ankaŭ ricevas specialan faldaĵon de fotoj donace de *Konrad Kail*, Prezidanto de la Loka Komitato. Ni ŝuldas grandan dankon al S-ro Kail kaj lia kunulo en la Foto-Butiko, *S-ro Marvin Burk*, pro ĉiuj fotoj faritaj dum la Kongreso.



41st Esperanto Congress, Spencer, Iowa: *Left to right seated:* Gilbert Nickel, Helen Nickel, Doris Connor, G. Alan Connor, C. W. Baldwin, Dr. Lehman Wendell, C. L. Krantz. *Standing:* Master Burk, Konrad Kail, Vera Olhausen, Mrs. C. W. Baldwin, S. T. Sampson, Minnie Anderson, Geo. Huisman, Adolph Beintker, Vera Beintker, Fern Huisman, F. A. Post, Dr. Margaret Kidder, Betty Baldwin, M. Whipple Bishop, Maude Kail, Harold Struthers, Mrs. S. T. Sampson, Zona Krantz, Mrs. C. L. Krantz, Isabel Snelgrove, Clara Olsberg, Maximiano Villareal. *Not shown in photo:* Marvin Burk, Preston Davis, Jr., Park Morton, Beatrice Ruff, Rintaro Taki.

Business Tops Agenda At Esperanto Confab

The Esperanto convention in its second big day has mostly business sessions. Friday's business group included several reports and committees. That evening a dinner was staged at the Tangney hotel. Claude Baldwin

World Language Meeting Here

The forty-first annual congress of the Esperanto Association of America will be held here in Spencer, Iowa, on Thursday, June 28, 1951. The meeting will be held at the Tangney hotel. A get-acquainted evening will bring all members together at the Midwest will learn Esperanto and put it to good use for bettering international relations between our country and countries of the world. Officials believe that Esperanto is a naturalistic and democratic method of this section of America is well for developing Es-

SPENCER DAILY REPORTER



Attend Esperanto Congress---

Six members of the Esperanto movement in America posed for the above photo at the Spencer Municipal airport Saturday morning following the arrival of Preston Davis, Jr., from Columbus, O., by plane. Davis is shown at the right in the above photo beside his airplane. From Spencer, Davis piloted Rintaro Takl, of Kobe, Japan, (left) to New Mexico, after which he flew on to Los Angeles. From left to right in the above photo are Takl, Konrad Kall, Spencer, Gilbert Nickel, Wilmington, Del., G. Alan Connor and Mrs. Connor, New York City, and Davis. The Esperanto Congress ended here Sunday night.

Esperanto macht Fortschritte als Welthilfssprache, erklärt Jahresbericht

Spencer, Jo. Rockefeller der baby in New York erschien. Die Generalsekretariat der Esperanto Association of North America...

41st Esperanto Congress Ends

Two directors of the Esperanto Association of North America were elected Sunday. The convention ended its third day in Spencer.

Elected to the board of directors were W. B. D. Hackett, Tor...

Dr. Solzbacher Reports On Esperanto Use

Dr. William Solzbacher of 11 Avenue, president of the Esperanto Association of North America, reported on the progress of the language during his address to the delegates at the 41st annual congress.

THE HERALD STATESMAN, YONKERS, N. Y.

Des Moines Register Sat., June 30, 1951

ESPERANTO UNIT MEETS IN IOWA

(The Register's Iowa News Service.) SPENCER, IA.—Thirty members of the Esperanto Association of North America met here Friday in the first "interlanguage" group's forty-first annual congress.

Delegates from several countries heard a speech prepared by William Solzbacher, Youn...

LA 41^a KONGRESO DE EANA, SPENCER, IOWA

EN tipa urbeto de la vasta mezokcidenta regiono de Usono kunvenis ĉi-jare la Kongreso de EANA. De la dudek-oka de Junio ĝis la unua de Julio, la verda standardo de Esperanto kunligita kun la strelplena ruĝa, blanka kaj blua standardo de Usono, flirtis de stango antaŭ la Hotelo Tangney en Spencer, Iowa.

Kiam s-ro Connor kaj mi alvenis per vagonaro la 26-an de Junio ni trovis, ke *gesinjoroj Gilbert Nickel* el Wilmington, Delaware, estis jam sur la perono por saluti nin. Ili aŭtomobilis pli ol 1300 mejlojn por ĉeesti la Kongreson. Kompreneble, ni tuj renkontis ankaŭ s-ron *Konrad Kail*, la ageman prezidanton de la loka Klubo.

Sabate alvenis per sia privata aeroplano s-ro *Preston Davis, Jr.*, el Ohio. Li flugis unufoje ĉirkaŭ la urbeto kaj 'bombardis' ĝin per flugfolioj pri Esperanto. Laŭ lia aserto, tiu 'bombardado' celas distastigi mondkomprenon inter la homoj anstataŭ detruiri la homaron.

Bele brilis la suno dum la tagoj de la Kongreso, kvankam ĵus antaŭ nia alveno terura uragano detruis tutan urbeton ne malproksime de Spencer, kaj kelkajn tagojn post la fermo de la Kongreso okazis timiga fajro en la urbo mem, dum kiu la butikoj de unu el niaj membroj, s-ro *Harold Struthers*, preskaŭ ruiniĝis. Tamen oni povis ŝerci, kaj laŭ onidiroj post la Kongreso: '*Esperanto set Spencer on Fire!*' (laŭvorte tradukita: '*Esperanto bruligis Spencer*', sed laŭ signifo, '*Esperanto entuziasmigis Spencer*').

Plej elstaraj okazintaĵoj de la Kongreso estis la Esperanto-Bankedo vendrede vespere kaj la Pikniko sur la farmbieno de *gesinjoroj Sampson* dimanĉe. Dum la bankedo ni frandis la plej bongustajn manĝaĵojn. Menuo en Esperanto ebligis al ni scii precize, kion ni manĝas; ke la terpomoj estis 'novaj terpomoj en brunigita butero', ke la bulkoj estis 'buterbakitaj', kaj ke la torto, kiu gustas kiel ambrozio de la dioj, estas farita el fragoj. S-ro *Claude Baldwin*, konata advokato de Spencer, prezidis dum la festeno. S-ro *Rintaro Taki*, nia eminenta gasto el Japanujo, salutis la ĉeestantaron en la nomo de Esperantistoj de Japanujo. D-ro *Lehman Wendell*, pioniro de Esperanto rakontis diversajn spertojn el sia vivo.

La pikniko estis unuaranga okazaĵo. Afablaj membroj de la loka klubo provizis kavalkadon de aŭtomobiloj por veturigi ĉiujn proksimume 10 mejlojn for de Spencer al la belega 240-akrea farmbieno de *gesinjoroj S. T. Sampson*. Kiam ni alvenis, ĉiu partoprenanto ricevis bukedon de floroj. Grandaj tabloj kun benkoj staris sur la herbo malantaŭ la domo, kaj sur ekstera fajro oni rostis la plej necesan manĝaĵon de ĉiu Usona pikniko - kolbasetojn, aŭ, laŭ Usona esperantista slango, 'varmegajn hundojn' (Hot Dogs). Post bonega manĝo, nia gastiganto, s-ro *Sampson* gvidis nin ĉirkaŭ la bieno, montris al ni altan, rondan, aerumitan konservejon por la maizo, kaj gvidis nin al la kampo preskaŭ duonmejlon for, kie la porkoj - pli ol cent kvindek porkoj - paŝtis sin. Jes, mi diras 'paŝtis sin', ĉar tio estas precize,

kio okazas en Iowa.

La aferkunsidojn de la Kongreso prezidis estrarano de EANA, s-ro Gilbert Nickel. La loka radio-stacio KICD prezentis 15-minutan intervjuon pri Esperanto, kaj la gazetoj en Spencer raportis ĉiutage pri la Kongreso. La Kongresanoj spertis mirindan afablecon de la loĝantaro en la urbeto, kaj esprimis sian specialan dankon, admiron kaj sinceran bondeziron al la nova Esperanto-Grupo en Spencer pro ĝia laboro.

-- Doris Tappan Connor

GENERALO BASTIEN RESPONDAS

MI tre atente legis en AMERIKA ESPERANTISTO (Aprilo 1951) la recenzon de Sinjoro W. Solzbacher pri mia libro *Naŭlingva Etimologia Leksikono*, kiel li, mi tre bedaŭras la preserarojn, kiuj enŝoviĝis. Tamen mi esperas, ke ili ne tro malhelpos al la celo, kiun mi fiksas al mi, kaj ke Franco, ekzemple, legante *abcès* aŭ *adjuvant*, komprenos sen iu malfacilaĵo, ke temas pri *abcès* aŭ *adjuvant*.

Sed pri aliaj rimarkoj mi devas konfesi, ke mi ne samopinias kiel S-ro SOLZBACHER. La miskompreno devenas de la fakto, ke li staras sur pure lingvistika kampo, kaj mi sur la praktika. Tiu verko ne sin turnas al lingvistoj aŭ tre kleraj studentoj, sed al la esperantista publiko, el kiu la pli granda parto estas meze aŭ eĉ malmulte klera.

VORTO 'ETIMOLOGIA'. -- Mi persistas en la opinio, ke tiu leksikono estas etimologia. Certe ekzistas Etimologiaj Vortaroj, kiel KLUGE por la germana lingvo, ERNOULT et MEILLET por la latina, kiuj pristudas la profundan originon de la vortoj en diversaj antikvaj lingvoj. Sed ekzistas ankaŭ multaj vortaroj verkitaj de lingvistoj, kiuj nomiĝas 'etimologiaj', kaj montras nur la alilingvan vorton, el kiu formiĝis la pristudata vorto. Inter dek aliaj, el diversaj lingvoj, mi citu la tre bonan *Dictionnaire étymologique de la langue française* de Albert DAUZAT (1938). Ekzemple, pri *abcès*, li citas nur la latinan *abscessus* (kiun ankaŭ mi citis), kaj, se la leganto volas esplori pluen, li serĉu en kompleta Etimologia vortaro de la latina lingvo. Same pri la fama vortaro HATZFELD-DARMSTETER, kiu pretendas montri la etimologion kaj la sinsekvajn transformiĝojn de la francaj vortoj, kaj kiu haltas, kiam ĝi atingis la latinan lingvon, aŭ la germanan, aŭ alian. Mia leksikono estas etimologia en la sama grado, kiel la verkoj de tiuj famaj lingvistoj.

La esperantaj vortoj ankoraŭ ne havas historion aŭ transformiĝojn; etimologio haltas, kiam oni atingis la naciajn vortojn, el kiuj ZAMENHOF ĉerpis siajn radikojn. Pli profunda esploro povus nur kopii la kompletajn verkojn jam ekzistantajn en diversaj lingvoj.

Sur la praktika kampo, la problemo povas esti formulata tre simple. Ĉu oni povas pretendi, ke ZAMENHOF, elektante siajn radikojn,

atentis la sanskritan aŭ la hebrean lingvon? Li estis tro praktika homo! Li elektis *abato*, ĉar li trovis tiun formon en la *nuntempaj* lingvoj, kaj tute ne ĉar la origina vorto estas aramea. Tiu aramea vorto interesas la lingviston, sed ĝi ne respondas al la demando: Kiel estas elektita la vorto *abato*?

VORTOJ MANKANTAJ. — Kiam mi preparis tiun duan eldonon, mi atendis la samajn kritikojn, kiuj estis 'salutintaj' la unuan. Tial en la antaŭparolo mi provis klarigi, ke la elekto de la naciaj vortoj estas iom arbitra.

En 1908, post apero de la unua eldono, la recenzinto de la *Revo* skribis ĝentile, sed klare:

'Eble S-ro BASTIEN kelkfoje montras vortojn, kies nur finiĝo estas germana; eble li tro pruvas aŭ tro deziras pruvi per ĉiuj rimedoj.' Kaj li citis kelkajn germanajn (?) vortojn: *embarrassieren*, *frottieren*, *epessieren*, *invitieren*, *deprimieren*, kc. Mi rekonis la ĝustecon de tiu rimarko, kaj forstrekis tiujn vortojn en la nova eldono. Nun S-ro Solzbacher faras la riproĉon ekzakte malan, kaj bedaŭras, ke mi ne enskribis: *abrupt*, *absorbieren*, *akzeptieren*, *Adaptation* . . . Kiun mi aŭskultos? . . .

S-ro SOLZBACHER citas 7 rusajn vortojn, kiujn mi forgesis (?) sur la unua paĝo. Eble pri la vorto *absurdnij* oni povas diskuti (kvankam la popola vorto estas *nelepij*). Oni trovas ilin en kompletaj vortaroj (ekz. la grandformata vortaro MAKAROFF, kiu entenas 60.000 vortojn), sed ili ne estas rusaj, ili ne apartenas al la lingvaĵo de meza Ruso, kaj ne troviĝas en vortaro entenanta 15.000 vortojn.

Brito riproĉis, ke mi enskribis en la anglan kolonon vortojn, kiuj, li diris, ne estas vere anglaj, sed fremdaj, kvankam konataj de iu nombro da Britoj. La fakto, ke tre kompetentaj homoj faris al mi kontraŭajn kritikojn ŝajnas montri, ke mi efektive sekvis la mezan vojon, kiun mi estis fiksinta al mi. . . .

Mi ne diskutos pli longe. Mi ne pretendas, ke mi faris ne kelkajn forgesojn aŭ erarojn. Mi nur volis montri, ke la kritikoj de S-ro Solzbacher devenas de malsama koncepto pri tiu verko, kiun mi nomis *leksikono*, precize por montri, ke ĝi ne estas kompleta etimologia vortaro. En ties preparo mi devis ofte diskuti kun mi mem, ĉu mi enskribos tiun ĉi aŭ tiun vorton, eble ne sufiĉe konatan, eble alilandan, eble ne vere apartenantan al la lingvo, eble tro diferencon pro formo aŭ senco: tia elekto estas iugrade arbitra, kaj ne povas kontentigi ĉiujn.

-- Louis Bastien, Paris

Lasta Informo de Komunista Ĉinio: Inspiritaj de hungaraj komunistaj sciencistoj (*vidu AE Jan '51*), ankaŭ la ĉinaj progresema sciencistoj de la Kolegio de Agrikulturo komencas esplori pri hibridoj. Jen la unua rezulto: Por ricevi pli grandan rapidecon de traktoro oni krucigis ĝin kun ĉas-hundo. La traktoro ja ricevis mirindan rapidecon, sed ĉe ĉiu vojkurbiĝo ĝi suprenlevas la malantaŭen radon kaj eligas la benzinon.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity.

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. Brief course of 64 pages25c
REED'S PRACTICAL GRAMMAR, Dr. Ivy Kellerman-Reed. Very complete beginner's text for self or classes, giving extensive examples, dialogue, etc. Offset reprint, with some pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with index. Original price 75c, reduced to less than half-price35c
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 entertaining illustrations for rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto with pictures. 160 pp.30c
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "Six-books-in-one": history, textbook, reader, world directory, and two dictionaries. All in one volume. 245 pp.Paper \$1.50; Cloth	\$3.00
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, Dr. Benson. A rare wonder-book with 11,000 pictures, all-Esperanto, 560 pp.Cloth	\$6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, Cox. A detailed analysis of Esperanto grammar, with examples .371 pp.Cloth	\$1.50
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Mario A. Pei. A guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> . 663 pp.Cloth	\$6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's little pocket companion. Offset ed. 80 pp.25c
EDINBURGH DICTIONARY. Esp-Eng & Eng-Esp. Complete, in concise form. The very best small dictionary. 288 pp.Cloth	.85c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj al la Universala Vortaro de la Lingva Komitato". 490 pp.Cloth	\$2.60
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Latest edition including appendices of proper names and neologisms. Each meaning listed individually. 348 pp.Cloth	\$2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO Zamenhof and others. Model chrestomathy and literary guide. 472 pp.Paper bound	1.50
Rare ed., ptd 1924, royal blue cloth with gold	Cloth bound 2.50
KARLO, Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo from boyhood to marriage. 43 pp.25c
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio). The best "Reader". Bound in blue, art vellum, 8vo, 996 pp.Cloth	\$2.00
ESPERANTO SORTIMENTO. Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, <i>Thais</i> , by Anatole France, (2-in-1) 66pp; <i>Rozujto Ĉiumiljara</i> , miracle of love, 48 pp. Each book 25c. Entire sortimento for only	\$1.00
INDIAN BEAD STARS. White ground, green star in center85c
GREEN STARS. White ground, gold trim, brooch or button50c

Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records

Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. And it's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. *All* designed so you can *master* Esperanto.



The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage*."
- (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow 'Study Guide' (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course," as described above, will be sent postpaid for *only* \$36. **FOR GROUP STUDY:** Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only* \$6 more for Textbook and complete Study Guide. Delivered with a full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

Doris Tappan Connor, 114 W. 16 St, New York, N.Y.